

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Luiza Carol

Jindřiška Drahotová

Paulo Freire

Mireille Grosjean

Zsófia Kóródy

Ilona Koutny

Viktor Lufimpu


Stefan MacGill

Radojica Petrović

Martin Strid



ilei



Edukado al respektoplena turismo
Busan, 2017

ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN):	3
Martin STRID: <i>Paŝante kantu poemojn por enkapigi lingvon</i>	4
Zsófia KÓRÓDY: <i>AGEI (la ILEI-sekcio kun historio nuntempo kaj estonto)</i>	15
Jindřiška DRAHOTOVÁ: <i>Ĉeĥa paradizo</i>	19
Viktor LUFIMPU: <i>Necesas profesia instruado en Afriko</i>	20
Programo de la Jaro de la Lernanto	21
Luiza CAROL: <i>Dek jaroj en Esperanto-lando</i>	27
Paulo FREIRE: <i>Instruista trejnado</i>	29
<i>Prestiga premio por prestiga pedagogo</i> (Mireille GROSJEAN).....	31
<i>Rekorda sesio en UAM, Poznano</i> (Ilona KOUTNY)	33
<i>Renkontiĝo de esperantistaj familioj, 2017</i> (Radojica PETROVIĈ)	34
<i>Instruista Trejnado: Modula Instruista Trejnado</i> (Zsófia KÓRÓDY).....	35
<i>Kiel ILEI sukcesas helpi al ĉiuj kolegoj en la mondo</i> (Mireille GROSJEAN).....	36
Por via notlibro (Stefan MACGILL)	37
<i>La 50-a kongreso de ILEI</i> (informoj, aliĝilo) (Radojica PETROVIĈ)	38
Informoj pri ILEI.....	41

ESTRARO DE LA LIGO

- Prezidanto:** Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Rilatoj kun UNESKO kaj FIPLV. Observanto de ILEI ĉe UEA. Informado al ekstero. Ekzamenoj.
- Vicprez.:** GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitata agado.
- Sekretario:** Emile MALANDA NIANGA. P. O. BOX 2787 Cape Town 8000, Sud-Afriko. <emalandan@yahoo.fr>, <ilei.sekretario@gmail.com>. Kontakto kun sekcioj. Koleghelpa Kaso.
- Vicsekr.:** Elena NADIKOVA. ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>. Lerneja agado. Eo-centroj.
- Estrarano pri financoj:** William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.
- Estrarano:** Radojica PETROVIĈ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Kongresoj de ILEI, rilatoj kun TEJO, retaj aferoj, „Interkulturo”.
- Estrarano:** Ivan COLLING. Cx.P. 1701, Ag. Mal. Deodoro, Curitiba, PR. BR-80011-970, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Universitata agado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono,
Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma
„La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute,
Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio,
Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iłona Koutny,
Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu;
AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственной
Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la eksteraj kovriloj: fotoj
pri nia kongresurbo Busan

Enkonduko

Karaj legantoj,

Ni ĉendancu tra ĉi tiu numero de *Internacia Pedagogia Revuo* kaj ni eksciuj multon. Pri kursoj kaj renkontiĝoj, pri akiro de profesiaj kapabloj en Afriko, pri la brazila pedagogo Freire, pri lertigado de geinstruistoj en Poznano, Pollando, pri prestiĝa premio por D-rino Katalin KOVÁTS, pri internaciaj kunvenoj en Israelo kaj finfine sed tute centre pri la evoluo de la Jaro de la Lernanto!

Nia revuo estas nia ligilo; mi dezirus, ke ĝi nutru nin kiel umbilikoŝnuro. Kompreneble la fontoj por trovi informojn, sciojn kaj rimedojn en rilato kun pedagogio abundas en bibliotekoj kaj en la Reto. Tamen mi povas imagi, ke en kelkaj landoj sudaj pluraj kolegoj niaj voras la revuon, ĉar ĝi estas eble la sola fonto por legi pri pedagogio, pri instruado, pri spertoj de gekolegoj.

Fonton valoregan ni havas: *edukado.net*. Ne nur ni membroj de ILEI sučas el tiu fonto, alia instanco volis substreki la altnivelan laboron de Katalin KOVÁTS; temas pri la urbo Aalen, Germanio, kiu aljuĝis al ŝi la FAME-kulturpremion. Gratulon Katalin!

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

Paŝante kantu poemojn por enkapigi lingvon

aŭ: Feroan dancon baladan svati al Esperantujo

de Martin STRID (Svedio), martin.strid@gmail.com

Pri la aŭtoro



Martin STRID estas svedespo¹ de tridek jaroj kaj patro de denaskaj espoj. Inĝeniere li laboras pri medioprotektado en ŝtata agentejo por svedaj vojaroj kaj fervojaro. Amatore popolmuzikas precipe per violono kaj kantado. Inventis interalie tajpe muziknotan metodon „tonsilaboĵ” kaj fonetikegajn „langolajn signarojn” rapidskriban, gestolingvan k.a.. Gvidas aŭtokooperativon en sia urbo Borlänge, aktivas politike kaj membras en Pasporta Servo.

Resumo

Multjarcenta kutimo ĉendanci baladojn vivas en la Feroaj Insuloj plu. La feroa lingvo estas pranorvega dialekto kiu saviĝis kaj daŭre viglas danke al sia balada kulturo. De tiu lingvofirmiga potenco de la feroa danco povos profiti ankaŭ la lingvo Esperanto. Kompare kun aliaj specoj de danco, la feroa havas plurajn avantaĝojn por la Esperantomovado. En kombino kun karaktero feroa de baladaj strofoj, ĝi donas eblon instrui kaj vivi kaj nian lingvon kaj nian poezian literaturon kaj nian movadan historion en tre ĝuinda maniero. Ĝis nun baladiĝis centoj da esp-aj poemoj kaj kantoj. Jam temp' esta' lanĉi ĉi „novan” (por ni) fenomenon en la internacian kulturon.

Baladojn dancu feroe

En la ILEI-konferenco en Nyíregyháza en aŭgusto 2016 prezentiĝis ĉi rubrika ideo kaj la fenomeno de feroa danco. La prelegon „Feroaj Insuloj, balada kulturo kaj Esperanto” multaj konferencanoj maltrafis pro aliaj samtempaj aranĝoj. Laŭ peto de la redaktisto de *Internacia Pedagogia Revuo*, jen estas resumo skriba pri ĝi.

¹ Svedespo = sveda esperantisto (etno- aŭ lingvosufikso)

Ferooj estas insularo kruta en Atlantika Oceano kun kelkaj tutmonde unikaj kulturaj fenomenoj. Unu el tiuj estas la vivanta kutimo ĉendanci baladojn. La feroa lingvo dum jarcentoj, sub la rego de la dana, travivis sur Feroaj Insuloj malgraŭ eksteraj influoj kaj lingva premo. Unu grava faktoro por pluvivigi kaj konservi la feroan estis ĝia balada kulturo.

La feroa estas malgranda lingvo. Esperanto estas maldensa lingvo. (Aŭ pli precize: La lingvanaroj estas malgranda kaj maldensa.) Ambaŭ lingvoj bezonas atenton, apogon kaj klopodon por daŭre evolui.

Tiaj baladaj ĉendancoj kiuj helpis savi la feroan lingvon, povos fortigi ankaŭ Esperanton. Kantante baladon oni ekzercas la lingvon. Lerni kaj parkerigi baladan tekston estas bona helpilo por lerni kaj memori la lingvon. Enkonduko de feroa danco en Esperantoeventojn signifos pliriĉigon de la Esperantokulturo, pliproksimigon de espa poezio al la espa popolo kaj amuzan metodon por plifirmigi Esperantajn lingvokonojn.

Scio pri grandaj partoj de la pasinteco de Esperanto mankas al multaj espoj. Per kelkaj trafaj baladoj instruaj ni povus pli bone konatiĝi kaj familiariĝi kun nia movada historio.

Feroa danco havas ankaŭ aliajn avantaĝojn precipe por Esperantujo, kiujn al vi, pluleganto baldaŭ mi prezentos. Do, la esenco de jena lanĉo estas enkonduki tiun ĉi novan kulturen fenomenon en la internacian movadon.

Feroaj Insuloj

Feroaj Insuloj situas en la norda parto de la Atlantika Oceano, meze inter Islando, Norvegujo kaj Skotlando – sur la mapo en la ruĝa cirklo. Feroaj Insuloj estas aŭtonoma regiono de Danujo sed ne membras en Eŭropa Unio. Estas loĝantoj preskaŭ kvindek mil sur dek ok insuloj. La ĉefurbo Tórshavn havas dek sep mil loĝantojn.



Al la insuloj skandinavoĵ ekde la jaro 850 venis. La liberan respublikon paganan anstataŭis norvega rego en la jaro 1035, la Kalmara unio inter Danujo, Norvegujo kaj Svedujo en 1396 kaj dan-norvega regno en 1523. De post la paco en Kiel en 1814, Feroaj Insuloj

estas parto de la reĝlando Danujo. La loĝantoj parolas dialekton de antikva norvega lingvo, kiu (skribe) interkompreneblas kun la islanda. (Feroanoj komprenas la parolatan islandan, sed islandanoj ne tuj komprenas la feroan). Al ilia kultura heredaĵo apartenas malnovaj baladoj de ĉirkaŭ sepdek mil strofoj.

Rakontas historion balado

Historiistoj certas, ke baladojn eŭropanoj multloke ĉendancis jam en la 14-a jarcento. Sed kiom longe ĝis tiam, oni ne scias. La plej multaj strofoj de baladoj feroaj forme similas al pranordujaj poemoj en la metriko „ljóðaháttur”, ekzemple Havamal („Altula Parolo”) el la pagana epoko, kies ambaŭ tradukojn trovu ĉe nia retejo (L1).

Inter malnovaj baladoj, kiujn oni ĝis hodiaŭ dancas en Feroaj Insuloj, ni povas mencii kelkajn, kiuj estas jam tradukitaj en Esperanton. Tri el ili temas pri Sigmund, kiu kristanigis Feroajn Insulojn en la deka jarcento. Mia plej ŝatata estas la Bresta balado, suka rakonto pri brava kuraĝo, ŝafĉaso, rokkrutajtoj, mara vetkuro, mortbatalo, perfido kaj orfiĝo. Alia, la Jalgrima balado, rakontas la finan lukton de la lasta libera ĉefo en Bjarmalando, kiam la reĝo Harald la Belhara unuigis Norvegujon ĝis la Blanka Maro. La Vilmunda balado temas pri aventuro ĉe sveda reĝo en la Garda Regno, okajarcenta embrioj de la hodiaŭaj Ukrainio kaj Rusio. En la balado de Virgar ni sekvas batalulon aŭdacan ĝis la burgo de Bern, en la eŭropa Epoko de Popolmigradoj (2a-5a jarcentoj).

Aparte atentindas la balado Petro sinjor' kaj Elinborg, kiu, kvankam ĝi estas mezepoka, prezentas virinon tiom kuraĝan, vole fortan kaj entrepreneman ke ŝi povas esti heroino modela por feministoj hodiaŭaj.

La Roncevala batalo, kiun mi ankoraŭ ne tradukis, estas la feroa versio de la fama balado La kanto de Rolando. Ĝi rakontas pri lukto inter frankoj kaj eŭskoj en la jaro 778a en Pirenea Montaro sed estas verkita jarcentojn poste.

La aliaj baladoj troveblas en nia retejo <http://tretis.tone.se>, klaku al "Legu en esperanto", klaku al „Baladoj”, glitu malsupren al „Tradukitaj” kaj „El feroa”.

Kial kaj kiel ili dancas baladojn?

Feroanoj ĉendancas feste, festene kaj ĉe aliaj okazoj, kiam kolektiĝas multaj homoj. Tradicie en vilaĝoj tio estas la "pinta" maniero ĝoji kune. Nuntempe

oni ĉendancas ankaŭ en dancokluboj (L2) kaj kelkaj bazlernejoj dediĉas ĉiujare tagon al baladaj dancoj (L3).

Krom ĝuon, baladoj komunikas rakontojn, fortigas la senton de kuneco en la komunumo kaj funkcias kiel „bastiono” de la lingvo. La rakontoj estas dramaj kaj interesaj kaj meritas aŭskulton. En la moderna tempo la tekstoj estas ĝenerale haveblaj, sed tradicie ili estis diversagrade atingeblaj – foje iu balado „apartenis” al certa familio, en kiu ĝi herediĝis kaj oni dancis ĝin eble eĉ nur unu fojon jare, por ke aliaj homoj ne povu lerni ĝin. Male, ĉe popularaj baladoj multaj el la dancantoj scias parkere pli-malpli la tutan tekston kaj kunkantas.

Dum la danco novaj homoj povas eniri en la ĉenon, kaj oni povas eliri el ĝi eĉ meze en balado.

Dancas ne nur kampuloj kaj vilaĝanoj. *(La virino meze en la dekstra foto estas la reĝino de Danujo.)*

Oni ne bezonas ilojn. Ĝenerale en feroa danco estas nek muzik-instrumentoj nek elektraj mikrofono, laŭtparolilo kaj simile. Sufiĉas bona planko (eĉ foje ne, nur natura tero), agrable milda lumo kaj dancemaj homoj. Kaj baladestro!



La plej grava persono en ĉendanco estas la baladestro. La baladestro estas iu, kiu parkerigis la baladon kaj „posedas” ĝin – regas ĝiajn etoson, rapidon, tonalon kaj vicordon de strofoj. En ĉiu strofo, neniu krom la baladestro kantu la unuan vorton. Lerta baladestro povas aldoni aŭ forpreni strofojn depende de la etoso. La baladestro povas havi apud si apoganton, kamaradon, kiu ankaŭ parkerigis kaj voĉe fortigas – kvazaŭ vivanta laŭtparolilo. Baladestro devas koncentriĝi, do oni ne ĝenu kaj ekzemple ne enĉeniĝu ĝuste apud la baladestron. Ĉiu balado devas havi sian baladestron; dum la ĉeno dancas unu baladon post alia, oni ŝanĝas de unu baladestro al alia.

Baladestro ne devas kapabli bele kanti. Sufiĉas laŭte kaj ritme paroli, tiel ke ĉiuj aŭdu la vortojn. Baladestroj feroaj estas diversaĝaj, kaj maljunaj kaj junaj, kaj ĉirkaŭ triono el ili estas virinoj. En malnova tempo oftis homoj, kiuj parkeris milojn da strofoj.




Ĉeno serpentumas

Dancoĉeno feroa tre malofte estas cirklo, kaj neniam granda cirklo. Pli similas ĝi al „kolbaso”, iom kunpremita kun pluraj kurboj kaj eĉ branĉiĝoj (L4). Rimarku en la filmeto kiel la ĉeno fluas

kaj ĉiam ŝanĝetas siajn lokon kaj formon. Rimarku ankaŭ kiel pli da homoj enĉeniĝas dume. Grave estas ne havi grandan distancon de vidalvidaj dancantoj; oni ja volas esti kune kaj proksime, rigardante unu la aliajn. Longa ĉeno multfalde povas tute pleniĝi la dancoplankon,



se tiomas da homoj. Tiajn faldojn brust-al-brustajn kaj dors-al-dorsajn ebligas la tre fleksebla manteno [vd la desegnaĵojn de la aŭtoro – NdlR]



Dum la danco oni laŭvice renkontas la aliajn dancantojn en la ĉeno, unu post alia, vizaĝ-al-vizaĝe – ĉu ne ideala moviĝo por interkona vespero?

La paŝoj estas simplaj, do facile memoreblas kaj lerneblas por homoj el diversaj kulturoj: paŝu per ambaŭ piedoj du fojojn maldekstren, unu fojon dekstren, ripetu ĝis finiĝas la balado.

Feroe danci povas ĉiu kiu kapablas piediri. La ĉeno ne estas pariga kaj sendependas je aĝo, sekso, sportemo aŭ eĉ vidkapablo: jena filmeto (L5) montras dancon feroan en Svedujo, kies unu dancanto estas tute blinda. Sed ĉu vi povas diveni kiu el ili estas la blindulo?

Ĉendanco vere ĉiam povas esti la kulmino de evento, kiel montras ĉi sekvaj filmetoj: en konferenco juna virino dum paŭzo estras la baladon Drako Longa (L6). Post suneklippo fariĝas pluraj ĉenoj en ĝin spektinta homamaso

tiom granda, ke la baladestrino uzas mikrofonon (L7). Ekskursanoj al neloĝata insulo Malgranda Dujmo grimpintaj sur ĝian supron dancas la Brestan baladon, kies historio okazas parte sur tiu insulo (L8).

Ĉiam estas loko por plia homo en la ĉeno. Feroaj baladestroj opinias ke la ideala nombro da homoj en ĉeno estas inter dudek kaj cent dudek. Sed oni povas esti inter tri kaj plurcent.

La karaktero de feroaj baladoj

Balado estas rakonto, kiun oni dancas. Feroa danco havas ununuran muzikilon: la homoj mem. Se oni uzus aliajn muzikilojn ol la homajn voĉojn kaj piedpaŝojn, estus pli malfacile aŭskulti la rakonton



ĉar oni ne povus tiom klare aŭdi la vortojn. La dancantoj emfazas la ritmon per siaj korpaj movoj, svingaj manoj kaj foje stamfoj.

Dum skandinavaj baladoj ĝenerale havas inter sep kaj dudek strofojn kaj malofte pli ol tridek, feroaj havas multajn – kutime inter kvindek kaj cent, foje plurcent. Rakontiĝas ja historioj aventuraj.

Feroe la rekantaĵo plej ofte estas la pli longa parto de ĉiu strofo, kaj ĉiustrofe sama. Ĝin ĉiuj kantas. Tio ebligas al la dancantoj multe kunkanti kaj senti sin plene partoprenantoj. Ĝi ankaŭ donas tempon al ili por pripensi la ĵus diritan strofon kaj al la baladestro por ripozigi sian voĉon – eĉ iom trinki – kaj rememori la sekvan strofon.

La nombro da paŝoj en strofo – kaj en verso – ofte estas malpara, eĉ primo. Feroa danco havas ses paŝojn (liven², ambaŭ piedojn, dufoje, poste dekstren ambaŭ unufoje) kaj ĉiu strofo havas ekzemple 29 paŝojn, aŭ 31. Do iun strofon oni komencas per certa paŝo (el la ses dancopaŝoj) kaj la sekvan strofon per alia paŝo. Tio povas esti malfacila por kelkaj komencantoj, sed aŭtomatiĝinte tia paŝado donas al la danco pli pelan fluon, kvazaŭ nehaltigebla rivero. Krome ĝi ebligas al baladestro lerte manipuli la takton tiel ke iu forta piedstamfo venu ĝuste sur certa vorto en la dramo. Kaj se iu iam stumblas sur la teksto (kio ja povas okazi), la baladestro povas tuj daŭrigi

² Liva = maldekstra

sian kantadon sen atendi „ĝustan baton en la takto” aŭ „ĝustan paŝon en la danco”.

Kial ĝuste ĉi tiu danco estas bona ĝuste por Esperantujo?

De feroa danco resumu ni la bonojn kiuj plej gravas por niaj movado kaj eventoj:

- Komuna ĝojo kaj kuneco,
- Lingvaj ekzerco kaj firmigo,
- Bonaj historioj,
- Interkoniga ĉeno,
- Simplaj paŝoj,
- Sen teĥnikaĵoj,
- Danco malferma por ĉiuj.

Nu, bone, sed kial precize la feroa maniero danci estu modelo nia? – Ĉar tiu maniero estas elprovita dum jarcentoj kaj ĝis hodiaŭ tre bone funkcias. Ĝi aspektas simpla, tamen kiam oni studas ĝiajn detalojn oni malkovras neatenditajn avantaĝojn, el kiuj la ĉefajn koncize priskribi mi provis en ĉi supraj ĉapitroj.

Vizio

Mi havas revon. Mi volas dividi ĝin kun vi. Jen:

Plej multaj espoj scias kaj ŝatas danci feroe. Ĉiu dua aŭ tria espo estas taŭga baladestro kaj oftas homoj kiuj majstras plurajn baladojn, eĉ longajn. Feroumo estas kulmino de multaj diversaj Esperantoaranĝoj – internaciaj kongresoj, lokaj kunvenoj, junularaj tendaroj kaj familiecaj renkontiĝoj. Antaŭ eventoj oni eĉ anoncas, kiuj fame konataj baladestroj aliĝis. Tiaj baladaj ĉendancoj allogas ĉiam pli da homoj al nia movado, fortigas ĝian senton de kunesto kaj kunfarado kaj altigas la lingvonivelon de espoj ĝenerale. Per la baladaj rakontoj homoj komprenas la mondon iom pli bone, inspiriĝas al aktualaj defioj kaj ĝojas kaj ridas kune.

Esperantistojn oni rimarkas per tio, ke „ho, estas tiuj kiuj ĉendancas baladojn”.

– „Ankaŭ mi volas tion! Ĝi aspektas tiel mojose.”

– „Ĉu?”

– „Jes!”

– „Do lernu Esperanton.”

Kaj oftigās la kutimo ke ekzameno en Esperantokurso konsistas el tio, ke ĉiu lernanto mem elektas, parkerigas kaj estras en feroa danco baladon.

Tiel eĉ timiduloj kuraĝigās por havi fortan voĉon kaj eldiri ne nur poemon sed ankaŭ sian opinion, eĉ pri lingvaj kaj aliaj homaj aferoj, eĉ inter fremduloj.

Kiel ekhavi baladojn

Oni devos ja havi ion por kanti ĉendance. Estas tri manieroj provizi nin per la bezonataj baladoj:

- Traduki kanton el alia lingvo,
- Verki novan rakonton (heroan),
- Baladigi ekzistantan poemon.

En 2014 mi komencis traduki el la feroa la Sigurdan baladon, poste la baladon Drako Longa [vd la *deseĝnaĵon de la aŭtoro – NdlR*], la Brestan baladon kaj kelkajn pli. La fabelo de Sigurd bildiĝas sur miljaraj runŝtonoj en Svedujo. La Drako Longa temas pri batalo en la jaro 1000 kiam la reĝoj de Danujo kaj Svedujo kune venkas la reĝon de Norvegujo. La Bresta balado rakontas la tagon, kiam Sigmund naŭjara perdas siajn patron kaj onklon en subita atako.



Plu mi pensis: Kial ne verki novajn baladojn, pri herooj de la Esperanto-movado? La unua tia estas la Valdemara balado. Ĝi temas pri la frua pioniro Valdemar Langlet kaj prezentiĝis en kongresoj en 2015; la Sveda Esperanto-kongreso en Upsalo kaj la UK en Lillo.

Verkante novan baladon heroan en Esperanto oni povas rakonti la historion de homo memorinda, gravan okazon en nia historio aŭ fenomenon specifan por Esperantujo. Dramigu per dialogoj. Rakontu la „faktojn”, kio okazas kaj kion la homoj diras, anstataŭ iliajn pensojn kaj sentojn. Ne abundu malgravaj detaloj kaj nomoj nek longaj priskriboj.

La kerno de balado estas ĝia rakonto. Mi faris por mi regulon ke balado havu minimume kvin strofojn, kun ripetado kaj / aŭ rekantaĵo. Se estas malpli da strofoj, la rekantado ne havas sencon.

Por baladigi poemon, oni:

- Trovu baladigindan poemon,
- Trovu aŭ komponu melodion takte taŭgan,
- Trovu aŭ verku rekantaĵon konvenan,
- Kantu ĝin en feroa danco!

Forirante de UK en Lillo en aŭgusto 2015 mi jam sciis ke mi verku libron pri feroa danco kaj kolektu por ĝi baladojn. La aktuala labornomo de tiu nova verko estas Baladojn dancu feroe (BDF).

Estas tiom da poemoj! Ĝis novembro 2016 estas kvarcent baladoj faritaj kaj ankoraŭ multaj poemoj kolektitaj baladigotaj. Ili longas de kvin ĝis pli ol kvarmil strofojn, aŭ inter unu minuto ĝis tridek sep horoj, originalaj kaj tradukitaj, novaj kaj antikvaj, dramaj, humuraj, tragediaj, instigaj kaj aliaj, grandparte ĉerpitaj el nia literaturo. Tiuj kiuj jam havas melodion kaj rekantaĵon, troveblas sur la paĝo Baladoj en la retejo <http://tretis.tone.se>. Supre sur tiu retpaĝo estas tekstoj de unuopaj baladoj por preso (klaku sur la &-signo). Malsupre estas kajeroj kun baladoj vicigitaj laŭ longo (nombro da paŝoj) kaj fine estas kajero enhavanta registrojn de baladoj, tekstoj, melodioj, verkistoj ktp.

Unue mi pensis, ke mi devos iom elekti kaj sarki, kiuj poemoj taŭgas enhance kaj stile por esti baladoj. Sed poste mi tiun penson forlasis kaj nun juĝas nur laŭ metrika reguleco (samformeco) kaj nombro de strofoj. La celo estas ke ĉiu esperantisto povu serĉi mem kaj trovi plaĉan tekston laŭ sia propra gusto.

Kion kanti – kie komenci?

Tamen iom da sugestoj mi ŝatas doni por via komenco:

El originale Esperantaj baladoj komencu per „Ezopa Saĝo” de Kalocsay. Tie estas kvindeko da mal- kaj mezlongaj fabloj amuzaj kaj moralinstruaj. Mi donis al kelkaj feroajn melodion kaj rekantaĵon kaj por aliaj komponis novajn. Kvar el ili mi parkerigis mem kaj kutimas fini mian prelegon per „Hermes kaj la lignohakisto”.

Amuzajn historiojn havas Berndl, ekzemple „La portreto”, Cezar, kies „Ĉe kuracisto Zamenhof” jam estis ĉendance sukcesa, Gazda, rigardu na³ „Balado pri la morto de dek-du-kapa drako”, kaj Schwartz, inter kies multaj ridigaj mi mencias na „La diversaj aĝoj de l' homo”. Tre indas ankaŭ tradukitaj el la ĉeĥa „La bapto de caro Vladimir” kiun verkis Havliček Borovský (mi ege sopiras ke iu – eble vi? – parkerigu ĝin por ke ni povu ĝui ĝin en ĉendanco!), el la norvega la mallonga „Ĥolera kanto” de Prøysen, kiu tuj fariĝis populara en espa rondo, kaj el la rusa „Car' Nikita kaj kvardek liaj filinoj”, fantastika historio de Puŝkin.

Inter pli serenaj baladoj mi proponas unue poemojn de Devjatin kaj Schulhof. Aliaj atentindaj (inter tiuj kiujn mi ĝis nun baladigis) estas de Grabowski, Ĥoĥlov, Kalocsay, Piron kaj Zamenhof. Tradukojn dancindajn trovu jam nun el la angla, ĉina, slovaka kaj kelkaj aliaj lingvoj. Svedajn baladojn havas ni amase, tre diversetosajn, kaj mezepokajn kaj pli modernajn. Multajn el ili mi jam sukcesis ligi al muzikaj filmetoj, per kiuj vi povas taksi kiujn el ili vi ŝatas.

Taŭgaj por infanoj estas, krom Ezopa Saĝo, la baladoj de Jung kaj Nenjo Rimanto kaj fabeloj el Ĉielarko de Baghy.

Al tre ambicia baladestro, kiu volas entrepreni longegan epopeon oni povas proponi la polan „Sinjoro Tadeo”, la kartvelan „Kavaliro en tigra felo”, la hungarajn „Toldi” kaj „Johano la Brava” kaj estonte la sudamerikajn „La Luzidoj” el la portugala kaj „Martín Fierro” el la hispana (ĉi-lastaj du en ĉi-skriba momento ankoraŭ ne baladiĝis).

Kaj kiam ni jam fariĝis multaj feroe dancantoj kantemaj, ni ĉendancu ĉiuj kune Interkonan baladon, por kiu ĉiu partoprenanto verku, laŭ donitaj ekzemploj, unu strofon pri si – kaj kantu ĝin mem.

Do: Elektu vian propran baladon! – Prenu tiun, kiun vi mem plej ŝatas!

Aliĝu – ni bezonas vin!

Por ke balada kulturo kun feroa danco fariĝu realo en Esperantujo, ni bezonas

- Dancemulojn
- Baladestrojn
- Kuraĝon!

³ Na = akuzativa montrilo

Ni lernu danci... teni, ĉeni, en- kaj eliri, paŝi, rekanti... En kiel eble plej multaj Esperantoaranĝoj estu feroa danco, minimume unu horon por evento kaj ideale inter unu kaj du horojn ĉiutage.

Partoprenu ankaŭ vi tiun feroan dancon kiam ŝancon vi havos. En la ĉenon venu kaj ĝuu la rakontojn kaj rekantojn! Dancu tiom ke vi lernu, al kutimiĝu kaj eĉ kapablu instrui.

Provu ankaŭ mem lerni baladon, por ke vi povu estri ĝin en danco. Elserĉu vian preferan baladon (L9). Komence elektu mallongan, per kiu vi certe sukcesos. Post kiam vi tralegis ĝin, komprenis la rakonton kaj aŭskultis ĝian melodion, ripetu ĝin al vi mem ĝis vi komencas scii ĝin sen legi la tekston. Daŭre ripetu – prefere vi kantu laŭte kaj samtempe paŝu dance – ĝis la balado bone sidas en via kapo. En la verko BDF, trovebla en la balada retejo, estas ĉapitro ĉekomenca, kiu temas pri metodo parkerigi.

Krei ni volas reton da baladestroj kaj homoj, kiuj emas fariĝi baladestroj, por ke ni povu apogi unu la alian. Kontakti nin kaj ni helpos vin!

Ek!

Retaj referencoj kaj literaturo

Librojn pri baladoj kaj ĉendancoj en la internacia lingvo mi ne sukcesis trovi. Ankaŭ en naciaj lingvoj ŝajnas manki libroj pri balada kulturo el matematika kaj „socio-teĥnika” perspektivoj.

L1 = Retejo de Tretis, baladigita poemo Havamál,
<http://tretis.tone.se/t%20Havamal.pdf>

L2 = La dana-feroa balado Signhild Fiera,
<https://www.youtube.com/watch?v=DXN1c11ZyqI> (8:14)

L3 = La feroa balado Petro Sinjor' kaj Elinborg,
<https://www.youtube.com/watch?v=a8XeERcjb8> (5:26)

L4 = La Sigmunda balado pli nova, dua parto,
<https://www.youtube.com/watch?v=3NMUn-92vo8> (3:31)

L5 = La sveda balado La serpentego,
<https://www.youtube.com/watch?v=fQwPAdtKZ1k> (3:27)

L6 = La feroa balado Drako Longa,
<https://www.youtube.com/watch?v=abmpV57605E> (2:04)

L7 = La feroa balado pri Flóvin Bænadiktsson,
<https://www.youtube.com/watch?v=F5vhJXQqmKI> (1:57)

L8 = La Bresta balado <https://www.youtube.com/watch?v=FRgzYf0H1tQ> (1:13)

L9 = Retejo de Tretis, balada paĝo, <http://tretis.tone.se/pag.php?jen&lng=eo> .

Vikipedie aliru kapvorton „Feroa ĉendanco”, <https://eo.wikipedia.org/>

Baladoj sur poŝtmarkoj: https://commons.wikimedia.org/wiki/Faroese_ballads

Balado rokmuzike: <https://www.youtube.com/watch?v=BJ--Uw7a0tk>

Feroumu!

Germanio: AGEI

(la ILEI-sekcio kun historio, nuntempo kaj estonto)

de Zsófia KÓRÓDY, prezidanto de AGEI

En tiu ĉi jaro (2016) ni festas etan jubileon de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI, Verband Deutscher Esperanto-Lehrer - VDEL): antaŭ dek jaroj, en julio 2006 ĝi estis novfondita kaj fariĝis jura persono kun sidejo en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Mi fariĝis sekciestro kaj en 2008 ĝi ekhavis novan statuton. Post kelkvara antaŭa malstabila stato kaj neordigitaj rilatoj kun ILEI ĝi refortiĝis sub mia gvido kaj fariĝis la plej multnombra landa sekcio de ILEI. Tion superis nuntempe Ĉinio, kie la membraro de la landa instruista sekcio rapide kreskis en la lastaj kelkaj jaroj. Antaŭ ol rigardi niajn nuntempajn agadojn jen mallonga historia rerigardo.



Historio

Parolante pri la historio de Esperanto-instruado en Germanio ni devas mencii la rolon de **Germana Esperanto-Instituto (GEI)**. Ĝi estis fondita en 1908 post la 4-a UK en Dresden kiel Saksa Esperanto-Instituto kaj havis la celon prizorgi tradukadon el diversaj lingvoj al Esperanto, konsili al germanaj Esperanto-uzantoj kaj certigi altnivelan instruadon de Esperanto. Ĝi eldonis instrumaterialojn, prizorgis sian grandan bibliotekon kaj unu el la ĉefaj taskoj estis ekzamenado. Ĝis 1923 ĝi atingis tutgermanian gravecon, reprezentis ankaŭ la instruistaron kaj agadis por la plivastigado kaj oficialigo de Esperanto-instruado en lernejoj kun bona rezulto ĝis la malfondo la 31-an de decembro 1936.

En la Esperanto-arkivo de Interkultura Centro Herzberg la plej malnovaj dokumentoj pri germanaj instruistaj asocioj estas el 1930. Laŭ tio la **Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (EUGI, Esperanto-Vereinigung Deutscher Lehrer)** en tiu jaro organizis sian jarĉefkunvenon dum la 20-a Germana Esperanto-Kongreso (GEK) en Hamburgo. En alia dokumento same el 1930 la Esperanto-Unuiĝo de Saksaj Instruistoj raportas pri kresko de la membronombro de 380 al 433, do 53 novaj membroj en unu jaro, pri celaro por interpopola kompreniĝo citante vortojn de Zamenhof: „por la mondlingva movado ni ne volas revii, sed labori”.

Post la 2-a Mondmilito, la 9-an de januaro 1948 nova Germana Esperanto-Instituto estis fondita en München, kiu bone kunlaboris kun **Germana Esperanto-Asocio (GEA)**. Ĝiajn statutojn kaj diplomojn agnoskis la Bavara Ŝtata Ministerio por Instruado respektive la Universitato de München. Samtempe en la 50-aj jaroj fortigis sian agadon la instruistoj en EUGI, kiu havis la plej aktivajn landajn sekciojn en Hessen (Hesio) kaj Bayern (Bavario), kaj modelan fakan laboron faris en Niedersachsen (Malsupra Saksio) la t.n. **Arbeitsgemeinschaft der Esperantolehrer**. Tiu Labor-komunumo regule organizis Esperanto-kursojn kaj fakseminariojn por instruistoj, ricevis ministerian subvencion por pluklerigado kaj la trejnitoj trapasis Esperanto-instruistajn ekzamenojn de GEI ekde 1950.

La jarĉefkunveno de EUGI regule okazis dum la ĉiujara Germana Esperanto-Kongreso (bv. atenti, ke pro la politika dividiteco de Germanio ni parolas pri agadoj en la okcidenta parto, do en la Federacia Respubliko de Germanio). La asocio strebis atingi, ke Esperanto estu elektebla lerneja fako kaj ke multaj instruistoj havu fakan diplomon pri Esperanto-instruado. Laŭ raporto de julio en 1959 EUGI havis 172 membrojn, el inter kiuj multaj gvidis kursojn en lernejoj kaj en la t.n. Popolaltlernejoj (Volkshochschule) ili instruis plenkreskulojn.

La informadon servis regule aperigataj cirkuleroj kaj porokazaj alvokoj. Por eviti paralalecon de agadoj kaj konkuradon inter GEA, GEI kaj EUGI, la tri instancoj bone kunlaboradis kaj dividis inter si la taskojn. En 1967 GEI fariĝis parto de GEA kaj de tiam ĝi plenumas la organizadon de lingvo-ekzamenoj, ĝia biblioteko trovis novan hejmon en Aalen, EUGI restis jure memstara sub la gvido de Heinrich Müller el Hanovro kaj plej aktiva en la federacia lando Malsupra Saksio. Li regule organizis seminariojn kaj ekzamenojn por instruistoj kaj en la jarĉefkunveno en 1967 dum GEK en Hamburgo EUGI decidis fariĝi membro de la Internacia Laborrondo Sonnenberg kun la celo kunlabori en tiu organizaĵo. En 1968 la instruista asocio estis novfondita, akceptis novan statutojn kaj ekagadis sub la nomo

”Verband Deutscher Esperanto-Lehrer” (**AGEI, Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj**). Sub la aŭspicio de la Edukministerio de Malsupra Saksio en 1968 tie okazis granda internacia Pedagogia Konferenco, organizita de Helmut Sonnabend (1924-1986), kiu ne nur estris AGEI sed eĉ fariĝis ILEI-prezidanto en 1973.

Lerneja ekperimento, propedeŭtiko


Post tiu historia enkonduko estas facile kompreni, ke Germanio, AGEI kaj pli precize la federacia lando Malsupra Saksio gravan rolon ludis ankaŭ en la internacia agado de ILEI, kiu jam de 1968 planis eksperimente prui la taŭgecon de Esperanto kiel ideala dua lingvo por homaj interrilatoj.

Post kunvenoj kaj kunordigaj konferencoj ekz. en Maribor, Jugoslavio en 1974 ILEI en sia konferenco en la Internacia Domo Sonnenberg, Germanio, formulis la bazan principaron pri lernejoj kaj tri lernejoj el Malsupra Saksio fariĝis partneroj de lernejoj el Bulgario, Hungario, Italio, Jugoslavio (1-a regiono) kaj el Belgio, Greklando, Francio kaj Nederlando (2-a regiono) en la dujara, kvinlanda esplorkonferenco. Ĝi komenciĝis en 1975 kaj ĝin analizis FEOll (Instituto pri Kibernetika Pedagogio) en Paderborn.

En la fino de la 70-aj jaroj la ĉefaj agadoj rilatis al la internaciaj lernejoj eksperimentoj, eldono de lernmaterialoj, organizado de regulaj pluklerigaj seminarioj ĉefe en Sonnenberg (Malsupra Saksio), kaj provadoj je enigo de Esperanto-instruado en la lernejan sistemon. La rolo de **Paderborn**, de la tiea **Esperanto-Centro** kreskis pro la lerneja eksperimento, pro instalado kaj ekuzo de novaj teknikajoj, kaj ellaborado de nova instrumentado kun programitaj lernmaterialoj (Hermann Behrmann: Esperanto-programita).

Tie oni kolektis la jarkotizojn, dissendis IPR, vendis librojn, eldonis la AGEI-informilon „*Esperanto in Schule und Universität*”, varbis por partopreno en konferencoj, ktp. En 1981 Hermann Behrmann retiriĝis kiel prezidanto de AGEI, lin sekvis prezidantino Karin Ruff (ĝis 1986), poste s-rino Stefanie Tucker (ĝis 1992) kaj s-ro Michael Scherm (ĝis 2006).

Pri ĉio detale raportis la „Cirkulero de AGEI, ILEI-Sekcio Malsupra Saksio”, de 1982 „de F.R.Germanio” kaj inter 1992-2005 la asocia gazeto „Esperanto kaj Instruado”.



Membraro, celoj

Laŭ la Statuto de 1968 membro povis esti ĉiu, kiu estis interesita pri la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto, finance subvenciis aŭ alimaniere subtenis la asocion. Ankaŭ la nova statuto de 2008 ne postulis de la membroj esti instruisto. AGEI estas komunitila ascio por la sekvaj agadoj:

- informi pri Esperanto en lernejoj kaj universitatoj
- enkadrigi Esperanton en lernejan lingvoinstruadon
- proponi al universitatoj kursojn kaj studmodulojn pri Esperanto
- proponi klerigadon de Esperanto-instruistoj kaj strebi al ŝtata agnosko
- ellabori kaj disvastigi instru- kaj ekzamenmaterialojn en Esperanto
- realigi Esperanto-ekzamenojn laŭ internaciaj niveloj kaj kriterioj
- esti parolpartnero por la Edukministerio pri Esperanto-instruado
- kunlabori kun internaciaj instruistaj Esperanto-organizaĵoj.

La membronombro de AGEI estas ĝenerale stabila, tamen en la lastaj kelkaj jaroj montriĝis iom da malkresko ĉefe pro maljuniĝo kaj manko de entuziasma pli juna kolegaro.

Agado, servoj

La kunlaboro kaj kun GEA kaj kun GEI estas harmonia. De 2006 AGEI havas sian sidejon en **Interkultura Centro Herzberg (ICH)**, Germana Esperanto-Centro (GEC) en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz kaj kun la aliaj organizaĵoj komune plenumas multajn taskojn, organizas Esperanto-kursojn, ekzamenojn



kaj de GEI kaj de UEA/ILEI laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). La **Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo** sub la gvido de Peter Zilvar en kunlaboro kun AGEI ĉiujare 4-6 foje ofertas Studsesiojn por faka trejnado kaj pluklerigado de Esperanto-instruistoj kaj movadaj gvidantoj, ekde 2005 ĉiujare okazis tie pedagogiaj tagoj (TORPEDo Tradicia Oktobra Renkonto Pedagogia). Surbaze de la ĝisnuna sukcesa klerigado estas nun ellaborataj interretaj fakmaterialoj por nova Modula Instruista Trejnado (MITE).

Malgraŭ plurlokaj klopodoj bedaŭrinde multe falis la nombro de lernejoj, kie Esperanto estas en iu oficiala formo instruata, tamen en universitatoj ni havas pli bonajn rezultojn ekz. en Leipzig, Emden, Wiesbaden, Stuttgart. Bonaj atingajoj en la lastaj jaroj estas por Esperanto-instruado ankaŭ la kunlaboro

kun neesperantaj fakorganizaĵoj, ekz. kun la plenkreskula klerigorganizaĵo en Malsupra Saksio (LEB, Ländliche Erwachsenenbildung) kaj en pluraj urboj en Germanio ankaŭ kun la **Popolaltlernejoj** (VHS, Volkshochschule). VHS en Malsupra Saksio ankaŭ donas klerigĉelan laborforpermeson (Bildungsurlaub) por studemuloj, kiuj volas fariĝi Esperanto-fakuloj. Grava evento estis en julio 2013 la organizado de la 46a ILEI-konferenco en Herzberg am Harz/Sieber (106 aliĝintoj el 29 landoj), ja de 1974 ne okazis ILEI-konferenco en Germanio.

Ĉeĥa paradizo

de Jindřiška DRAHOTOVÁ (Ĉeĥio), drahotova@esperanto.cz

Ĉu mi iru al tiu „Ĉeĥa paradizo”, kiu eĉ proponas Esperanto-kursojn, kiam mi estos 90-jara? Jen ĉi sube raporto de Sinjorino Jindřiška DRAHOTOVÁ el Ĉeĥio. Ŝi priskribas sian agadon en maljunulejo. Eble niaj legantoj opinios, ke tia instruado estas tempo-perdo. Laŭ mi ne. Unue legu, kaj vi ekscios, kiom tia lernado povas riĉigi la vivon de maljunuloj. Due bonvolu konsideri, ke tiuj entuziasmaj maljunuloj eble havas genepojn, kiuj aŭdos pri la ava/avina pasio kaj deziros ankaŭ lerni nian lingvon, vojaĝi kaj kongresumi per ĝi. Ni semu kaj semu!

Mireille GROSJEAN, prez de ILEI



Ekde la jaro 1995 okazas du foje jare (printempe kaj aŭtune) en la pensiono Espero en la malgranda vilaĝo *Skokovy* en la distrikto *Mladá Boleslav* semajnaj seminarioj. La plej proksima, la 44-a, okazos la 3-an de oktobro 2016.

D-ro Jozefo HRADIL, kiu posedis la pensionon, estis la motoro de la loka movado. Esperantistoj venadis ankaŭ por kuracado, kaj ĝuis E-etoson. La doktoro mortis en la jaro 2008 kaj lia filo plu mastras la pensionon kaj volonte akceptas nian Esperantan grupon, malgraŭ tio, ke li ne kapablas paroli nian lingvon. La partoprenantoj de la seminarioj iom post iom ŝrumpas laŭnombre, venas proksimume 20 homoj, plejparte pensiuloj. Inter ili venas ankaŭ kelkaj eksterlandanoj kaj novaj interesatoj pri la lingvo por paroli. Laŭ bezono ni instruas en 2 aŭ 3 aŭ eĉ 4 grupetoj. Krom laboro pri la lingvo mem ni helpas konatigi partoprenantojn, helpas al ili labori per komputiloj kaj pri slojdoj zorgas artistino de popola manarto. La pensiono estas en la „Ĉeĥa paradizo”

en protektata pitoreska pejzaĝo, kiu proponas puran naturon kaj multajn proksimajn lokojn por ekskursi.

Mi kreis por instrui propran materialon, kiam mi instruis la lingvon en baz-kaj mezlernejoj en tempo ekster lernejaj horoj. Tion mi jam ĉesigis antaŭ du jaroj, ĉar la direktoroj ne volas akcepti min, ĉar mi ne havas pedagogian edukadon, krome mi mem jam iom kadukas. Prefere mi tradukas originalajn Esperantajn librojn al la ĉeĥa lingvo kaj prelegas en urba biblioteko pri diversaj temoj.

Pro malfacila moviĝo niaj anoj korespondas inter si, ofte telefonas kaj retumas uzante nian lingvon. Ŝajnas al mi, ke Esperanto grave altigas la vivkvaliton de niaj anoj kaj utile plenigas ilian tempon.

www.esperanto-aea.eu

www.esperanto.wz.cz

www.mlboleslav.cz/esperanto

www.evinatelier.cz

www.labutipirka.cz

Necesas profesia instruado en Afriko

de Viktor LUFIMPU (DR Kongo), <viktorkufimpu@gmail.com>

En multaj afrikaj landoj la gepatroj devas pagi lernejajn kostojn por ebligi al siaj infanoj eniri la lernejon. Nenio estas senpaga, ĉar tro ofte la instruistoj ne estas salajrataj de la Ŝtato, aŭ tro malregule. Tiaj elspezoj fariĝas pezaj por multaj familioj, kiuj ne havas konstantajn enspezojn.

Post la lernado de bazaj konoj akiritaj en baz- kaj mez-lernejo la junuloj sin trovas antaŭ la problemo de profesia kompetenteco. Kiel akiri ĝin? Ĝenerale la sola solvo estas la ŝanco esti dungita de profesiulo, kun kiu oni iom postiole fariĝos sperta. Sed tio postulas multe da tempo, kaj ne estas alirebla al ĉiuj. Kiel en aliaj partoj de la mondo, elektristo, aŭtomobil-riparisto kaj laboristoj en similaj metioj bezonas specifajn konojn ekde la komenco de sia profesia kariero. Oni konas ekzemplojn de personoj, kiuj ne povis trovi dungon pro manko da minimuma sperto, kvankam ekzistis la bezono dungi. Aliflanke ni memoru pri la situacio de Suda Koreio tuj post la dua mondmilito: Ĉio estis rekonstruenda, sed la aŭtoritatoj unue vetis pri amasa kaj kvalita instruado al la infanoj kaj junuloj. Post multaj jaroj tia politiko daŭras, kaj ĉiu povas observi la nunan ekonomian potencon de tiu industria lando! Ankaŭ Afriko bezonas disvolviĝi!

En la nordo de Angolo en vilaĝo, kiu bezonis konstrui domon, neniu el la tiaj senlaboraj junuloj spertis pri masonado, eĉ en la plej bazaj kapabloj. La respondeculoj devis dungi masonistojn de la apuda lando, DR Kongo, aŭ de Ĉinio, Koreio k.s.!

Evidente aperas la bezono de profesia klerigado. Sed kiel organizi tion en landego, kiu suferis multajn jarojn pro civila milito – kvankam nun ĝi povas aspekti riĉa pro la resursoj el nafto?

Kelkaj civitanoj konsciis pri la problemoj, komencis pripensi projekton de profesia lernejo. Temas pri angolanoj, el kiuj esperantisto angol-devena, loĝanta en Francio, kaj konservinta rektajn rilatojn kun sia devena vilaĝo. Ili jam havigis al si de la vilaĝestro promeson, ke estos tereno senpage liverita al ilia projekto. Sed, restas multaj problemoj! Komprenoble multaj klopodoj estos necesaj por solvi ilin!

Komento de Mireille GROSJEAN

Estas multaj tiaj bezonoj en Afriko kaj ne nur en Afriko; ĉu konstrui lernejon, ĉu lertigi homojn kiel Viktor priskribas ĉi-supre, ĉu bori putojn, ĉu subteni orfejojn... UEA kaj ILEI pripensas, ĉu indus, eblus, iel kolekti donitaĵojn por obteni ian superrigardon pri tiaj agadoj, kie esperantistoj helpas al esperantistoj kaj ili interŝanĝas spertojn. Vidu la novan projekton de Athanase kaj Cyprien en la nordo de Benino: „Asocio de Terkultivistoj Esperantistaj” en Facebook. Ni jam scias, eĉ se malprecize, ke abundas subteno de la Nordo al la Sudo per Esperanto. Ni plu agadu manenmane. Ni ĉiuj estas loĝantoj de la sama Planedo Tero.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

Programo de la Jaro de la Lernanto

Enkonduko

La Jaro de la Lernanto (plu laŭ la teksto – JdL) estis anoncita de UEA por la jaro 2016-2017. Ĝi spegulas tiun gravan signifon, kiun akiris edukado en la moderna mondo. Sub tiu termino ni konsideras ne nur instruadon en diversgradaj lernejoj, sed „edukadon” en ĝenerala senco. La moderna ekonomia situacio, sufiĉe rapide ŝanĝiĝanta, postulas de homoj ofte ŝanĝi sian profesion kaj pro tio konstante studi pri aliaj fakoj. „La edukado tra la tuta vivo” iĝis la ĉefa slogano de moderna pedagogio. Multe ŝanĝiĝis ankaŭ stud-manieroj, rimedoj kaj lerniloj. La apero de la tutmonda informa reto iĝis

potenca ilo por edukado kaj principe ŝanĝis la rolojn de lernanto kaj instruisto. Aparte necesas mencii interkulturan edukadon, kiun fakte devas trapasi dum sia vivo multaj popoloj. La moderna mondo iĝas pli kaj pli tuteca kaj senlima. Kaj multe pli aktualiĝis tiu temo nun, kiam la tuta mondo travivas migranto-krizon. Esperanto kiel ponto-lingvo kaj propedeŭtika lernobjekto povas kaj devos ludi sian gravan rolon en tiuj historiaj procezoj. Do, la aktualeco de tiu iniciato estas evidenta kaj ne maltrafenda.

La inaŭguro de JdL okazis en Nitra, dum la 101-a Universala Kongreso de Esperanto, la 26-an de julio, dum la Tago de la lernado. Tiun programon realigos UEA kune kun ILEI, al kiu UEA delegas la ĉefan prizorgon pri JdL kiel al la ĉefa internacia respondec-organizo pri instruado en Esperanto-medio.

Celoj de JdL:

la ĉefa – atentigi la mondan movadon kaj eksteran publikon al instruado de Esperanto (iloj, metodologio, strategio ktp);

detalaj: atentigi la vastan publikon pri:

- pedagogiaj problemoj en ŝanĝiĝanta mondo;
- apero de tute aliaj kaj nekonataj por la antaŭa pedagogio lernmanieroj kaj rimedoj, unuavice teknikaj;
- pripensado de poioma principa ŝanĝo de roloj de lernanto kaj instruisto;
- ellaboro de novaj didaktikaj principoj, strategio, metodologio ktp. por instruado de Esperanto tra la mondo.

Atendataj rezultoj, produktoj:

- atingo de 70 landoj ene de ILEI; atingo de 1000 membroj de ILEI;
- specialaj numeroj de IPR kaj JA, dediĉitaj al JdL;
- renovigo kaj plifortigo de kapabla agado de ILEI;
- renovigo de edukaj projektoj de ILEI (Interkulturo, Flugiloj de malfacila vento k.s.);
- realigado de novaj edukaj projektoj;
- aktivigo de universitata agado de ILEI;
- realigitaj esploroj:
 - a) pri uzado de JA en edukaj celoj kaj procedoj;
 - b) pri lernmanieroj/lernmetodoj, kiujn la instruistaro uzas por Esperanto;
 - c) kune kun UEA esploro pri E-centroj tra la mondo.

Tempoplano

Grize: jam realigitaj agadoj

Agado	Tempo	Resursoj	Respondecoj	Rezultoj
<i>Prepara etapo</i>				
Kreado de la logotipo	Jan. – apr. 2016		La estrarano pri konferencoj Radojica Petrović, la Estraro de ILEI	Kreita kaj aprobata la logotipo
Ideokolektado por JdL	Jan. – jul. 2016	Fortoj de la Estraro de ILEI	La Estraro de ILEI	Kreita enhavo por JdL
Kreado de la laborgrupo	Majo – junio 2016	Fortoj de la Estraroj de UEA kaj ILEI	La Estraroj de UEA, ILEI	Kreita laborkapabla grupo
<i>Ĉefa etapo</i>				
Inaŭguro de LdL dum UK en Nitra (Slovakio)	La 26-a de julio 2016		La Prez de ILEI Mireille Grosjean	
Prezento de la plej potencaj sekcioj en IPR (la ĉina, germana, franca kaj hungara)	№ 2016/3 2016/4 2017/1 2017/2		M. Grosjean (prez.), Xiao-feng GONG (Arko) (vicprez.), la 4 sekcioj, József Németh (red.)	Publikigitaj materialoj
Esploro pri E-centroj tra la mondo	Ekde junio 2016	Fortoj de la Estraroj kaj landaj sekcioj de UEA kaj ILEI	La estrarano de UEA L. Jungkee, la Prez. kaj la vicsekr. de ILEI M. Grosjean kaj E. Nadikova	Formita kaj adaptita por vasta uzado datumbazo pri E-centroj tra la tuta mondo
Prezento de E-centroj dum la ILEI-konferenco en Hungario	Aŭg. 2016		La estrarano de UEA Lee Jungkee, la Estraro de ILEI	Prezentitaj E-centroj
La 49- ILEI-konf. <i>Novaj vojoj de lernado</i> en Nyíregyháza (HU)	30 jul. - 6 aŭg. 2016		La estrarano pri konferencoj Radojica Petrović, la Estraro de ILEI	Okazinta ILEI-konferenco

„Kuncerbumado” pri JdL dum la ILEI-konferenco	La 1-a de aŭg.		M. Grosjean (Prez), E. Nadikova (vicsekr.)	Ellaboritaj aldonajoj al la programo por JdL
Difino/serĉado de financaj rimedoj por JdL	La dua duono de 2016		La Prez. Mireille Grosjean kaj la kasisto W. Harris	Formita buĝeto por JdL
Lanĉo de la projekto MITE – Modula Instruista Trejnado (por ILEI)	Dum 2017		Zsófia Kóródy nome de AGEI	Apero de facile atingebla trejnadkurso por instruistoj
Konkurso pri filmetoj instruaj, amuzaj kaj originalaj IPEFF	Dum la Jaro		La Prezidanto de ILEI Mireille Grosjean	Aro de instru-filmetoj
Partopreno en la malferma tago en la Centra Oficejo de UEA	Nov. 2016		La Prezidanto de ILEI Mireille Grosjean	Prelego “ILEI inter kreskoj, puŝoj kaj ŝanĝoj, defiplenkrozo”
ILEI-seminario en Orienta Azio (ISOA)	Nov. 2016		La Prez. Mireille Grosjean, la vicprez. Xiao-feng GONG (Arko)	Instrukapabligo
Universitata Kolokvo en Timișoara (Rumanio)	Nov. 2016		La vicprez. de UEA S. MacGill, la Prez. de ILEI M. Grosjean (malĉesta)	
Speciala numero de IPR, dediĉita al la 50- kongreso de ILEI	Fine de la jaro 2016		la redaktoro de IPR József Németh, la Prezidanto de ILEI Mireille Grosjean	Eldonita kaj disvastigita IPR
Speciala jubilea numero de Juna Amiko	2017/1 (150)		La Prezidanto Mireille Grosjean, la redaktoro de JA Stano Marček	Eldonita kaj disvastigita jubilea n-ro de JA
Informlaboro pri JdL kadre de la 6-a Afrika kongreso en Tanzanio	Dec. 2016		La vicprezidanto de UEA Stefan MacGill	

Informlaboro pri JdL kadre de NR	Fine de 2016		La Prezidanto Mireille Grosjean	
Informlaboro pri JdL kadre de la Interlingvistika studado en UAM en Poznano (PL)	Febr. 2017		Decidota	
AMO – LIMA seminario en Les Brenets (CH) pri instruado	25-28 majo 2017		La Prezidanto Mireille Grosjean kun aliaj	Instrukapabligo
Reeldono de Manlibro pri instruado de Esperanto	Dum la Jaro	Kapabligo a fonduso de ILEI	La Estraro de ILEI, d-ro Katalin Kováts, Germain Pirlot	Eldonita Manlibro (papera kaj reta)
Regula (en ĉiu numero) aperado de diversaj informmaterialoj pri JdL en IPR kaj en <i>Esperanto</i>	Dum la Jaro	Fortoj de la Estraro de ILEI	La Estraro de ILEI, ka redaktoroj de IPR kaj JA	Publikigitaj materialoj
Aktivigo de la projekto Interkulturo (pere de kontaktoj inter ĉinaj kaj brazilaj grupoj kaj aliaj aperontaj)	Dum la Jaro	Fonduso Interkulturo	La vicprezidanto de ILEI Xiao-feng GONG (Arko), la estraranoj Radojica Petrović kaj Ivan Colling	Aperinta interkultura komunikado
Renovigo de la paĝaro Interkulturo	Dum la Jaro		la estrarano Radojica Petrović	Renovigita paĝaro
Regula informado pri JdL tra diversaj amaskomunikiloj, inkluzive retajn ne nur ene de Esperanto-medio, sed ekster ĝi por pli vasta komunumo	Dum la Jaro		La Prezidanto Mireille Grosjean, la Estraro de ILEI	Publikigitaj materialoj

Esploro pri uzado de la materialoj de Juna Amiko en instruado de E-o	Dum la Jaro		La vicsekretario Elena Nadikova	Ricevitaj datumbazoj
Esploro pri diversaj lernmanieroj (metodoj) tra la mondo	Dum la Jaro		La Estraro de ILEI	Aro de materialoj
Monitorado de la realigo de la JdL	Dum la Jaro		La vicsekretario Elena Nadikova	Ricevitaj datumbazoj
Agadoj de sekcioj, dediĉitaj al JdL	Dum la Jaro		La sekciestroj kaj flanke de la Estraro la sekretario Emile Malanda Nyanga	
Okazigo de komunikado inter universitatoj pere de Esperanto	Dum la Jaro kaj poste		La universitata komisiono de ILEI, la estrarano Ivan Colling	Konstanta universitata kunlaboro pere de E-o
Kunlaboro kun la Ĝen. Direktoro de Centra Oficejo de UEA Veronika Poór pri subvencioj por diversaj kapabloj kaj instruado	Dum la Jaro		La Prezidanto Mireille Grosjean	Ricevitaj subvencioj por diversaj kapabligakaj instruadoj
Fermo de JdL	En UK kaj ILEI-kongr. 2017			
<i>Fina etapo</i>				
Analizo	Jul. – dec. 2017		La Estraro de ILEI	Rekomendoj por la sekvaj jar-programoj

DEK JAROJ EN ESPERANTO-LANDO

La komenco de ĉi tiu rakonto aperis en IPR 2016 2 kun komentoj de Mireille Grosjean kaj reagoj de la aŭtorino en dialoga formo.

Luiza: KIEL ONI HELPIS MIN MEMLERNI ESPERANTON



Mi ofte demandas min: kio estus okazinta, se la unua persono, kiun mi kontaktis, estus iu balbutanta eterna komencanto aŭ iu malafabla malhelpema ulo? Kio estus okazinta se, okaze de mia unua kontakto kun la esperantista komunumo, mi estus renkontinta kverelemajn personojn, insultantajn unuj la aliajn per fuŝa Esperanto aŭ eble krokodilante la tutan tempon? Ĉu mia novnaskita intereso pri Esperanto ne malaperintus? Ĉu??

Ĉar miaj unuaj paŝoj en Esperanto-lando okazis en nekutime taŭgaj kondiĉoj, eble netipaj (?!), mi konsideras min nun aparte bonŝanca pri tio. Ĝuste tial mi volas kundividi en tiu ĉi ĉapitro miajn personajn spertojn kiel komencanta lernantino, ĉar ili eble povus interesi propagandistojn kaj instruistojn pri Esperanto.

Dum la unuaj semajnoj, mi lernis laŭ la kurso „Bildoj kaj demandoj” de Hokan LUNDBERG, troviĝanta en la paĝaro de „lernu!”. Tiu kurso ŝajnis al mi bonega, kvazaŭ perfekte tajlorita por miaj gusto kaj bezono. Post 2 semajnoj, mi kontaktis telefone la unuan esperantiston, kies adreson mi trovis en la reto: tiu estis Jehoshua TILLEMAN, mia preskaŭ najbaro, kiu ekde tiu tago fariĝis mia amiko. Mi tiam ankoraŭ ne sciis, kiom bonŝanca mi estas: mi hazarde kontaktis unu el la ege raraj homoj, kiuj ja scipovas Esperanton je la plej alta nivelo (dum 10 jaroj mi renkontis neniun, kiu scipovas la lingvon pli bone ol li!) kaj posedas ankaŭ pedagogiajn kvalitojn, krom sia ĉiama preteco helpi komencantajn lernantojn kaj ne nur tiujn.

Baldaŭ mi partoprenis esperantistajn lokajn renkontiĝojn. Ankaŭ ĉi-flanke mi estis nekutime bonŝanca: dum miaj unuaj 8 jaroj de Esperanta vivo, la loka Esperanta grupeto, al kiu mi apartenas, renkontiĝis ĉiumonate en la hejmo de Martha OTTO, la prezidanto de la Bahaa Esperanto-Ligo, kiu portempe loĝis en nia lando (dum ŝi volontulis por la Bahaa Centro). La malgrandeco de la grupeto donis al ni ĉiuj la ŝancon partopreni diskutojn kaj ekamikiĝi. La gastigantino ne scipovas la lokan lingvon, do ni nature devis eviti krokodili. Ĉar la gastigantino estas afabla kaj ĉarma persono, ŝi sukcesis

krei vere varman etoson. Ŝi ankaŭ invitis tre ofte alilandajn esperantistajn turistojn, precipe pilgrimantojn vizitantajn la Bahaan Centron.

Mia unua kontakto kun la Esperanta komunumo okazis do en ŝia hejmo kaj lasis tre fortan impreson en mia koro. Mi rememoras, ke tiutage ni estis ĉirkaŭ 12 personoj en la saloneto de Martha. La ĉeestantoj apartenis al 4 religioj, minimume 4 etnoj, kaj la aĝoj variis inter ĉ. 20 kaj ĉ. 70. Krom mi, ĉeestis ankoraŭ 2 komencantoj, kiuj konatiĝis por la unua fojo kun la grupo, samkiel mi. La aliaj konis unuj la aliajn jam delonge. Estis la fino de majo kaj la apartamento de Martha estis superŝutita de freŝaj floroj. La fruktoj kaj kukoj alportitaj de gastoj bonodoris. Dum ni manĝis ilin, ni laŭvice diris po kelkajn vortojn pri nia familio, nia profesio, niaj ŝatokupoj, niaj interesoj...

Dum la unuaj jaroj, ĉiuj miaj esperantistaj geamikoj (precipe Jehoshua) faris por mi ĝuste tion, kion Dennis KEEFE saĝe rekomendas kiel la plej taŭgan metodon por plenkreskuloj: ili helpis min memlerni. Iom post iom, ankaŭ mi ekprovis helpi aliulojn memlerni. Kompreneble, memlernado de lingvo neniam finiĝas.

Indas mencii ĉi tie la grandan rolon de interreto koncerne mian esperantistiĝon. Ekde la unuaj paŝoj en Esperanto-lando, mi estis interŝanĝanta retmesaĝojn kun la kunlernantoj de „lernu!”, poste ankaŭ kun la anoj de TEVA, kun la legantoj de la revuo „Esperantista Vegetarano”... Miaj kontaktoj pere de interreto kaj skajpo plimultiĝis rapidege. Per interreto, mi aŭskultis kiel eble plej ofte la radioelsendojn de Ĉina Radio Internacia, por kutimigi miajn orelojn ankaŭ al azia akĉento. Lastatempe, mi ekkonis geamikojn ankaŭ pere de Esperanta RetRadio, kiun mi ofte aŭskultas kaj tutkore amas. Nun, ĉ. 90% el ĉiuj miaj esperantistaj geamikoj estas interretaj aŭ/kaj skajpaj geamikoj.

Mirejo: Kara Luiza!

El via teksto mi prenas kaj reliefigas diversajn ideojn.

Unue vi mencias la kontakton, vian unuan kontakton, kun altnivela parolanto. Tio estas tre pozitiva fakto. Plie tre gravas, ke li estis akceptema al vi, bonvenigis vin en la komunumo, ne korektis vin montrante superecan senton. Tio estas leciono por ni esperantistoj. Kelkaj el ni forgesas, ke iam ili estis komencantoj kaj pene kaj malrapide konstruis frazon tradukante ĝin en la menso el la gepatra lingvo. Ni ĉiuj devas esti paciencaj kaj toleremaj, kaj korekti amike kaj kuraĝigante.

Due mi volas mencii, ke certa distanco inter la lernanto kaj la majstro bezonatas. Tamen ĝi ne devas esti enorma. Se akademiano babilas kun komencanto, eble la afero fariĝos teda por ambaŭ. Ne nepre. Certa distanco

devas esti, por ke la majstro povu korekti la erarojn kaj klarigi la frazojn laŭ la demandoj kaj bezonoj de la lernanto. Tamen doktoriĝo ne nepras por tio.


Trie vi mencias, kiom interesaj estis la rekontiĝoj ĉe esperantistino, kunvenoj internaciaj kaj plurkulturaj, sen krokodilado. Jen bona maniero stimuli la motivadon de la lernantoj. Spertante la internacian etoson, ili ekuzas la lingvon en vera situacio kaj konfirmiĝas ĉe ili la konvinko, ke Esperanto estas utila por tiuj, kiuj ŝatas tiajn kontaktojn. Ni provu krei tiajn okazojn por niaj lernantoj. Baldaŭ venos la momento aliĝi al niaj juliaj kaj aŭgustaj kongresoj; ni pensu pri tio.

Kvare vi emfazas memlernadon, kaj la konsilojn, kiujn vi ricevis por atingi tion. Jes ja, la instruistoj ne devas nur klarigi gramatikon, sed konsili la lernantojn en ilia organiza prilerna agado.

Kvine vi mencias la uzon de la Reto. Estas fakto, ke ni havas nuntempe tiun mirindan ilon, kiu ebligas al ni esti en kontakto kun diversaj mondopartoj. Aŭskulti retradiojn, babili per skajpo, jen bonaj metodoj por aŭskulti la lingvon kaj ekuzi ĝin. En aprilo 2016 en centra Turkio, Kapadokio, okaze de la Mez-orienta Kongreso, mi aŭdis turkan junulon, kiu bonege parolis kaj rakontis sian manieron lerni nian lingvon. Li aŭskultis ĝin konstante. Nur tion li faris. Tio signifas, ke tage kaj nokte senĉese li fluigis Esperanton en siajn orelojn. Kaj la lingvo invadis lian cerbon kaj enĉambriĝis tie iom post iom. Li ne iris al kurso, li ne malfermis lernolibron. Li sorbis la lingvon el kanzonoj, prelegoj, raportoj, diversaj elsendoj de diversaj radioj kaj televidprogramoj. Fakte iom kiel bebo eksponataj al lingvo. La rezulto estis bonega!

Paulo FREIRE

Instruista trejnado



Eldonita de Irène Pereira en la retejo:

<http://www.questionsdeclasses.org/?Paulo-Freire-La-formation-des-enseignants>

Enkonduka noto: Paulo FREIRE (1921-1997) estis brazila pedagogo. Inter 1989 kaj 1991 Freire konsentas zorgi pri la edukado en la urbo San-Paŭlo, Brazilo, tiam mastrumata de la Laborista Partio. En intervjuo aperinta en la verko „A Educação na

Cidade” [Edukado en urbo] li prezentas la ĉefajn gvidliniojn, kiujn li intencas uzi kadre de instruista trejnado.

*Tradukis el la franca: Mireille GROSJEAN.
La tradukon kontrolis, laŭ la originala portugala varianto, Ivan COLLING).*

Estas ses bazaj principoj en la lertiga programo por edukistoj en tiu ĉi sekretariejo:

1. La edukisto estas la subjekto de sia praktiko. Estas lia tasko ĝin krei kaj ade rekrei.
2. La lertigado de la edukisto devas doni al li rimedojn, por ke li povu, surbaze de sia analizo pri sia ĉiutaga laboro, krei kaj rekrei sian praktikon.
3. La edukista trejnado devas esti konstanta, sistema, ĉar la praktikado estas farata kaj refarata.
4. La pedagogia praktiko postulas la komprenon de la komenco mem de la akiro de kono, tio estas, kiel efektiviĝas la konoprocezo.
5. La programo de edukista trejnado estas la kondiĉo por novorientiĝo de la instruprogramoj.
6. La programo de edukista trejnado devas havi jenajn bazajn principojn: a) la priskribon de la lernejo tia, kia ni volas ĝin, kaj kiu aperas kiel horizonto de tiu nova propono; b) la neceson doni al edukistoj elementojn de bazaj konoj en la diversaj kampoj de la homa scio; c) la alproprigon fare de edukistoj de la rezultoj de scienca progreso, kiuj povas kontribui al la kvalito de la lernejo.

Tiu ĉi programo havas plurajn formojn. Devas esti unuarangaj la lertigadoj okazantaj en la lernejo mem, kadre de etaj grupoj de edukistoj, aŭ kadre de pli grandaj grupoj el diversaj lernejoj. Tiu ĉi laboro konsistas en observo de la sinsekvo ago-pripensado de edukistoj, kiuj agas en lernejoj. Ĝi enhavas la klarigon kaj la analizon de la pedagogia praktiko, esploron pri temoj de la analizo de la praktiko, kiuj postulas teorian bazon, kaj refojan analizon de la pedagogia praktiko, surbaze de pripensado pri la praktiko kaj pri la teorio.

Pluraj agadoj jam fariĝis konkretaj. Mi substrekas la sisteman laboron de lertigaj grupoj kun edukistoj de la baza lernejo (porinfana edukado) kaj kun kunordigantoj, lernejdirektoroj kaj instruistoj, kiuj okupiĝas pri alfabetigo. (Freire aldonas klarigon pri interŝanĝo kaj kunlaborado kun universitatoj en tiu agado.) [...]

Fundamenta aspekto estas tutcerte la prioritato de la « dialoga rilato » en la instruado, kiu ebligas la respekton al la kulturo de la lernanto, la valorigadon de la konoj de tiu lernanto kaj la laboron havantan kiel elirpunkton la mondan koncepton de la lernanto. Sur tiu prioritato staras la pedagogia agado de la geinstruistoj. Tiu propono estas tre serioza kaj tre profunda, ĉar la partopreno de la lernanto devas ne esti komprenata laŭ trosimpliga maniero. Tio, kion mi proponas, estas pedagogia laboro, kiu per uzo de la konoj alportataj de la lernantoj (konoj, kiuj esprimas lian socian originon) ebligas pluiradon, supreniradon, kiu devas ne nuligi tiujn konojn aŭ subpremi ilin per novaj konoj. Tio, kion mi proponas, estas, ke la enlerneja laboro kaj akiro de konoj tie, estu grava kaj signifoplena por la lertigado de la lernanto.

Tio ne povas okazi per la simpla enmetado de informoj en la kapon de la lernantoj. Mi forigas la „bankstilan pedagogion” [kie okazas nur transdono de scioj]. Mi proponas kaj defendas pedagogion, kie kritiko kaj dialogo eblas, demandeman pedagogion. Mia dezirata publika lernejo estas tiu, en kiu okupas elstaran lokon la kritika akiro de signifoplenaj scioj tra dialoga rilato. Temas pri lernejo, kiu stimulas la lernanton al demandado, kritikado, kreado ; ĝi estas loko, kie oni proponas konstruadon de kolektiva scio, interplektante, pere de mondospertoj, popolan scion kun kritika, scienca scio. [...]

Prestiĝa premio por prestiĝa pedagogo

D-rino Katalin KOVÁTS laboras en la Esperanto-movado de jardekoj. Fine de la okdekaj jaroj mi komencantino konatiĝis kun ŝi en La Chaux-de-Fonds, Svislando. Mi sekvas kun admiro ŝian karieron. Daŭre ŝi donas kursojn kaj prelegojn, daŭre ŝi inventas novajn lernstrategiojn. Efike kaj altnivele ŝi helpas al ni ĉiuj pliboniĝi en nia profesia praktiko.

Nun venas oficiala agnosko pri tiu engaĝiĝo: D-rino Katalin KOVÁTS ricevis la 16-an de oktobro 2016 la Premion de la FAME-fondaĵo kaj de la urbo Aalen en Germanio.

En 2001 ŝi lanĉis la retpaĝaron *www.edukado.net*. Grupo ĉirkaŭ ŝi ekzistas, tamen ŝi estas la motoro. Ŝi tre trafte flaras la bezonojn de la instruistoj kaj adekvate reagas provizante nin ĉiujn per efikaj iloj kaj trafikaj konsiloj. Bunta estas la paĝaro; nepre vizitu ĝin, kaze ke vi tion ankoraŭ ne faris. Vi povas ĉendanci tra ĝi sen enuiĝi dum horoj. Vi povas ekkoni pedagogojn en la Panteono, vi povas ekscii multon en la Fotoalbumoj (ne maltrafu la albumon

Falsaj Amikoj, vi lernos multon!), vi povas viziti la bibliotekon de la Lerniloj, vi povas spekti filmojn por aŭdi la lingvon kaj plilarĝigi viajn konojn. Prestiĝa pedagogo ne estas vana vorto por Katalin. Mi miras, kiom ŝi sentas la bezonojn de la lernantoj kaj de la instruistoj kaj reagas rapide por kontentigi ilin. Ĉiam ŝi lanĉas ion novan; ekzemple la ludon RISKO. Poste venis EKPAROLU, kiam abundis kaj abundas la novaj Esperanto-parolantoj de la kurso Duolingo. La libreto *Poŝamiko* legatas en la tuta mondo; pli bona ol iu longa gramatika priskribo ĝi koncize donas la bazajn erojn de nia lingvo. Konstante saltante de lando al lando Katalin semas kaj kuraĝigas esperantistojn tra la mondo senlace. Mi ne povas imagi nian movadon sen tiu agado de Katalin.



Fakte kaj konkrete ŝi faras parton de la laboro, kiun ILEI devus fari. Edukado.net estas nemalhavebla. ILEI subtenas la paĝaron morale, kaj esperas, ke pli kaj plu Katalin zorgos pri ĝi same, kiel ŝi faris ĝis nun. En 2013 la Komitato de ILEI elektis ŝin Honora Membro de la Ligo. Mi estas tre feliĉa pri niaj bonaj personaj kontaktoj kaj nia amikeco. Gratulon! Admiron! Subtenon! Aprobos! Kuraĝigon! Aplaudon! Dankon!

*Mireille GROSJEAN
Prez de ILEI*

Rekorda sesio en UAM, Poznano

La ĉi-septembra **interlingvistika sesio** (17-23.09.2016) estis jam la 5a por la gestudentoj, kiuj antaŭ du jaroj komencis siajn postdiplomajn studojn kadre de la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz. 17 persistaj partoprenantoj (5 el Brazilo, po 3 el Hispanio kaj Pollando, po 1 el Svedio, Serbio, Ĉeĥio, Rusio, Kroatio kaj Belgio) atingis la trian jaron de siaj studoj, kiam okazas **specialiĝoj**. Ĉi-foje – pro la granda nombro de studentoj – povis okazi eĉ 4 specialiĝoj: pri Esperanta lingvistiko, esperanta literaturo, internacia kaj interkultura komunikado.

La kvara, la specialiĝo pri instruado de Esperanto donis eblon alorganizi grandan aldonan grupon da **instruista trejnado**: 18 personoj el 12 landoj decidis perfektigi pri instruado de Esperanto, krom la 3 el la interlingvistikaj gestudentoj. La programon gvidis d-rino Katalin KOVÁTS kun granda kompetento kaj elano, kontribuis Zsófia KÓRÓDY kaj prof. Ilona KOUTNY, pri movadhistorio d-ro Ulrich LINS. La partoprenantoj ekkonis interalie diversajn instrumentojn, instruilojn kaj internaciajn kunlaboreblojn, spertiĝis pri la pretigo de fonetikaj, gramatikaj, leksikaj kaj komunikaj ekzercoj... Saluti en la nomo de UEA kaj gastprelegis pri la taskoj de la *Jaro de lernanto* Stefan MACGILL, vizeprezidanto de UEA.



István ERTL prezentis la nuntempan Esperanto-literaturon por ĉiuj partoprenantoj kaj prof. Probal DASGUPTA la azian kontribuon al literaturo. István ERTL kaj Tomasz CHMIELIK enkondukis la partoprenantojn de la literatura specialiĝo en la sekretojn de beletra tradukado, Probal DASGUPTA analizis kun ili verkojn de aziaj aŭtoroj. Li gvidis kurson ankaŭ por tiuj kiuj elektis la lingvistikan specialiĝon, krome li prelegis anglalingve por kolegoj el la

Novfilologia Fakultato. Prof. Zbigniew GALOR traktis sociologiajn aspektojn de komunikado, interalie ankaŭ esplormetodologion, kaj Ilona KOUTNY la lingvajn aspektojn. Kontribuis al la programo Barbara PIETRZAK per esperanta radiofonio kaj Roman DOBRZYŃSKI pri spertoj en filmfarado kaj ĝia aplikado en instruado.

La sesio pasis en tre bona kaj internacia etoso (spektu la filmraportojn de Katalin KOVÁTS elirante el <http://edukado.net/novajhoj?id=646>). La komuna vespero ebligis artan prezenton de la partoprenantoj (ekz. Suso MOINHOS prezentis sian novan poemaron, Anna BARTEK kantis). La semajnon fermis la kultura festivalo Arkones (23-25.09: <http://arkones.org>) kie la gestudentoj prezentis sin, kun multaj interesaj programeroj, parte kompletigante la temojn de la studoj (kontribuis prelegantoj kaj ankaŭ iuj gestudentoj). Okazis memorkunsido dediĉita al du elstaraj esperantistoj mortintaj en tiu ĉi jaro: Michel DUC GONINAZ kaj Detlev BLANKE, kiuj kontribuis al la Interlingvistikaj Studoj (<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/stabo.html>). Dankon al ĉiuj kontribuintoj de la sesio kaj pro la helpo per stipendioj al ESF (Amu Poznanon: <http://www.esperantic.org/eo/edukado/interlingvistikaj-studoj/amu-poznanon/>) kaj ILEI, pro varbado kaj studenta helpo al Edukado.net.

Intervjuoj pri la Studoj en <http://pola-retradio.org/> 11.10.16 kaj en <https://www.youtube.com/watch?v=5LHLDgwNi5c>.

Ilona KOUTNY

Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Renkontiĝo de esperantistaj familioj, 2017

ILEI aŭspicios REF 2017

Renkontiĝo de esperantistaj familioj (REF) estas unika niĉo de Esperantujo, en kiu Esperanto plenspire vivas kiel natura lingvo. Dudeko (iam pli, iam malpli) da esperantistaj familioj, kun plej ofte diverslingvaj gepatroj kaj denaske E-parolantaj infanoj, ĉiujare kunvenas dum 10 someraj tagoj, ĉiam en alia lando, por kunvivado en komunumo kie la sola bezonata kaj uzata lingvo estas Esperanto.



Imagu francujan familion kun germanlingva patro kaj britdevena patrino, inter kies gepatroj unu venis el Armenio kaj la alia el Koreio. Kaj aliajn eblajn kombinojn. La natura solvo estas Esperanto kiel familia lingvo, sed ĝi ne funkcias por komunikiĝo kun la eksterfamilia medio - lernejo, stratamikaro, hejmgastoj. Kelkfoje ĝi eĉ donas stampon de alieco, iam eĉ misperceptata kiel sekteco. Dum REF ankaŭ tiu problemo malaperas en la nur-esperantista medio.

La tagojn plenigas diversenhava programo, kiun inventas, reĝisoras kaj plenumas la gepatroj kaj infanoj mem: komuna kantado, skeĉoj, film-vesperoj, rakontvesperoj, plurtaga serĉado de fantomo, promenoj, ekskursoj, gepatraj interkonsiliĝoj, danckonkursoj, sportludoj – la imagemo de REFanoj estas neelĉerpebla. Per ĉio ĉi, kaj per la unika koncentriĝo de E-denaskuloj, REF prezentas pedagogie fekundan esplorterenon. Ĉu ILEI, kaj E-pedagogio ĝenerale, sufiĉe konscias kaj konsideras ĝin? Verŝajne ne, bedaŭrinde. Tamen, almenaŭ por REF 2017, okazonta en la montara



infanripozejo „Rudnik” (*vidu la bildon, fotis R. Petroviĉ*), Serbio, 21-31 julio, ILEI montras apartan intereson decidinte aŭspicii ĝin. REFanoj ricevos kvanton da nova legmaterialo en formo de publikaĵoj de ILEI (*IPR, Juna Amiko, Okulo*), kaj ILEI espereble ricevos revenan informon – reagon de la novaj legantoj, kiu eble helpos kompreni, ekzemple, kaŭzojn de la magra

abonantaro de Juna Amiko.

Vi povas informiĝi pli kaj aliĝi al REF per [https://familioj.wikispaces.com/Radojica PETROVIĈ](https://familioj.wikispaces.com/Radojica%20PETROVI%C4)

Instruista Trejnado: Modula Instrukta Trejnado

Zsófia KÓRÓDY, prezidanto de la germana sekcio de ILEI, dum la ILEI-konferenco en Nyíregyháza informis la ĉeestantaron pri ellaborado de nova trejnsistemo MITE (Modula Instrukta Trejnado), pri ĝiaj strukturo, funkciado, tempoplano kaj montris ekzemplojn de jam pretaj materialoj.

MITE enhavos du ĉefajn branĉojn: instrukapabligon kaj fakan trejnadon por movadaj gvidantoj. La nova sistemo planas helpi ĉiujn, kiuj serĉas vojon al memstudado, ŝatus ne nur lingve sed fakte perfektigi kaj ne havas eblon por partopreno en alia, tradicia formo de pluklerigado. La interreta kadro por tiu sistemo jam pretas kaj nun sekvas la dua fazo, kiam la administrantoj enmetos la laŭpaŝe pretigitajn lernmaterialojn en la interretan platformon.

La ĉefaj principoj de la novtipa klerigsistemo jenas: la sistemo – post enskribiĝo - ebligas kontinuan, liberan aliron al la lernmaterialoj; la moduloj estos klare difinitaj kaj la kursoj enhavos riĉan kolektaĵon de instrumaterialoj kun aldona taskaro kaj kontrolcela demandaro; la unuoj postulos certan nombron de studhoroj kaj ebligas akiron de studpontoj; la sistemo ebligas kontaktadon kun kursgvidantoj kaj disponigos diskutforumon, donos konsultadeblon kun aliaj studemuloj.

La reta trejnkurso MITE estas ellaborata de kvarpersona germana teamo kaj estos senpaga. La moduloj celas la informadon kaj kapabligadon de instruemuloj kaj movadaj aktivuloj kaj ebligas studadon de Esperanto-gramatiko, lingvistiko, interlingvistiko, literaturo, metodologio, movad-historio kaj komunikado-informado. Al la reta trejnado aldoniĝos trejnsesioj kun ĉeesta studado kaj praktika periodo respektive provlecionoj ekzemple kadre de seminarioj, konferencoj.

Zsófia KÓRÓDY

Kiel ILEI sukcesas helpi al ĉiuj kolegoj en la mondo

ILEI havas mirindan sistemon: temas pri la **KOLEGHELPA KASO**. Per ĝi ILEI sukcesas financi la membrecon de pluraj dekoj da gekolegoj en diversaj mondopartoj, kie la kotizpago povas esti problemo. Nuntempe proksimume 60 membroj de ILEI membras tra tiu maniero. Nia Koleg-helpa Kaso funkcias nur per donacoj de aliaj membroj. Pro tio ni nun publikigas **DU ALVOKOJN**.

Alvoko al nia membraro

Bonvole aldonu ion al via kotizo, iun sumeton, por ke aliaj kolegoj en nepagipovaj landoj povu membri en ILEI kaj ricevi nian organon IPR. Ni elkore dankas pro via malavareco.

Alvoko al la ricevantoj de tia membreco

Bonvole skribu al ILEI („ilei.sekretario” ilei.sekretario@gmail.com, kaj ilei.prezidanto@gmail.com) dirante: mi deziras plu ricevi membrecon kaj la

revuon IPR. Nur tiel ni plu komunikos kun vi, ĉar ni scios, ke vi loĝas tie, laboras por Esperanto, agadas en via lando kaj havas intereson ricevi kaj legi IPR-n. Laŭ la regularo la limdato por anonci sian deziron membri en ILEI per la Koleg-helpa Kaso estas **la 15-a de januaro 2017**. Karaj membroj el foraj landoj: vi DEVAS fari tion, eĉ se peti ne decas en via kulturo. Kiel ĉiuj povas kompreni post legado de tiuj du alvokoj, la membreco en C-landoj per Koleg-helpa Kaso ne estas aŭtomata; ĝi eblas nur, dum estas iom da mono en la kaso.

Mireille GROSJEAN, Prez de ILEI

Por via notlibro

La revuo *Esperanto* bonvenigas edukajn tekstojn

La estraro de Universala Esperanto-Asocio nomumis respondeculon pri revuo *Esperanto*, pro la neceso rekapti la aperritmon. Edukriklataj artikoloj ĉiam bonvenas, egale ĉu de ILEI, aliaj agantoj aŭ unuopuloj. Tiu nomumito ankoraŭ ne havas aliron al la revua retadreso, do intertempe, bv. sendi kontribuaĵojn aŭ mesaĝojn kopie al <stefan.macgill@gmail.com>. Bonvenas koncizaj, informriĉaj tekstoj, kun plena klarigo de uzitaj akronimoj. Ni aperigas nur tekstojn unikajn al *Esperanto*. Fotoj tre bonvenas, sed senditaj aparte de la rilata artikolo kaj kun pikseldenseco de almenaŭ 300 pikseloj en colo (pec – alilingve dpi). La plimulto de reteje aperigitaj bildoj ne havas sufiĉan kvaliton. Antaŭdankon pro viaj kunlaboroj!

Por la redakcio: smg

Jaro de la Lernanto – unua postkonferenca traktado

En la ĵusa konferenco de ILEI ni prezentis liston de lokoj en kvin kontinentoj, kie la temaro de la Jaro estos traktitaj. Jam tio pruviĝas nekompleta, ĉar en la septembra ĉeesta sesio en UAM en Poznano okazis 90-minuta traktado. Post enkonduka prezento, la 22 partoprenantoj diskutis donitajn demandojn en du grupetoj. Vidu fotojn kaj raporton en la oktobra numero de la revuo *Esperanto*, sur paĝo 211. Jam okazas pliaj sesioj, en Ĉinio kadre de la 5a ISOA, en Slovakio ene de KAEST, en Roterdamo en la Malferma Tago kaj en la 6a Afrika Kongreso de Esperanto en Bunda, Tanzanio. IPR raportos pri ili.

smg

ILEI kongresos en Busan, 2017

La jubilea 50-a Kongreso de ILEI okazos en Busan, 15–22 julio 2017, antaŭ la 102-a UK, okazonta en Seulo. LKK organizos karavanan veturon el Busan al Seulo por partoprenantoj de ambaŭ eventoj. La kongresa ĉeftemo de ILEI 2017 estos „Edukado al respekto plena turismo” omaĝe al la *Internacia Jaro de Daŭripova Turismo* deklarita de UN, kaj al la subteno de la Korea kaj Busana Turismaj Organizaĵoj al ambaŭ kongresoj, UK kaj de ILEI.

Busan estas la dua plej granda urbo de Korea Respubliko ĉe la suda marbordo, ĝia grava turisma centro kaj granda havenurbo, kiu tra la historio rolis kiel pordo al eksteraj landoj. Ĝi harmonie kunigas la tradician kaj modernan vizaĝojn, kun belaj temploj kaj spirhaltigaj modernaj konstruaĵoj. Dum la Korea milito ĝi restis neokupita de malamiko kaj tien venis rifuĝintoj el ĉiuj anguloj de la tuta Koreio. Tial, iliaj kulturoj estas harmonie interplektitaj en la urbo Busan.

La kongresejo estas en la moderna junulargastejo ARPINA. Ĝi situas en unu el la turisme plej viglaj distriktoj de Busano, Haeundae, ĉe la fama strando Haeundae, la plej ŝatata de ne nur koreoj, sed ankaŭ de alilandaj vizitantoj. Somere tie svarmas pli ol miliono da homoj. Multaj turismaj celoj kaj vizitindaĵoj troviĝas je promendistanco de ĝi, aŭ atingeblas per mallongdaŭra metro-veturo. ARPINA disponas komfortajn dormoĉambrojn en kaj eŭropa kaj korea stiloj, diversstipajn kaj diversgrandajn salonojn por diversaj kongresaj programoj, restoracion, bufedojn kaj sportajn ejojn kaj instalaĵojn, kiujn la kongresanoj povos uzi, ĉio sub unu tegmento kaj ĉio bonpreza, kun specialaj rabatoj por la grava evento de ILEI. Kun tia oferto kaj proksimaj turismaj vizitindaĵoj, ARPINA donas taŭgan spacon por traktado de la kongresa temo „Edukado al respekto plena turismo” kaj por la cetera, tradicie riĉa kongresa programo de ILEI.

Pliajn informojn vi trovos rete ĉe www.ilei.info.

Bonvenon ĉe ILEI en Busan!

Radojica PETROVIĆ, Estrarano pri kongresoj de ILEI



Aliĝilo

por la 50-a Kongreso de ILEI
Busan, 15-22 julio 2017

- Nomoj: Persona(j) _____
Familia(j) _____ Ino Viro
Naskiĝdato _____ Profesio _____
- Lando _____ Kodo, urbo _____
Loĝadreso _____
Retadreso _____ Telefono _____
- Ĉu vi konsentas, ke via retpoŝtadreso aperu en publika listo de partoprenantoj? Jes. / Ne .
- Mi aliĝas al la konferenco kiel (elektu unu):
 membro de ILEI, ne membro, infano, junulo.
 handikapulo, familiano, nur-simpozio/unu-du-tage.
- Datoj (jjjj-mm-tt) de: alveno _____ foriro _____
- Mi kotizas _____ EUR. (Vidu la kotiztabelon sur la sekva paĝo.)
- Mi kontribuas _____ EUR por ILEI-agado tra jena(j) kaso(j) / fonduso(j) / agado(j): _____
- Mi komprenas, ke la aliĝo validas nur post kompleta pago de la kotizo kaj mi pagas jene (indiku vian pagmanieron):
 Al ILEI-konto ĉe ING-banko, IBAN: NL55INGB 0004676855,
BIC: INGBNL2A. Aldonu 5 € se vi pagas de ekster Eŭropa Unio.
 Al ILEI-konto ĉe UEA *ilek-a*, indikante „ILEI-Kongreso 2017”
 Ene de Korea Respubliko: interkonsente kun ILEI-sekciestro en KR
- Mi bezonas / ne bezonas invitilon por peti la vizon.
- Mi posedas pasporton n-ro _____ de la ŝtato _____
_____ validan ĝis la dato _____.
- Por la Lingva festivalo mi proponas prezenti la lingvon _____ .
- Aliaj kontribuproponoj por la konferenca programo: _____

- Aliaj komentoj, sugestoj, proponoj _____

- Mi komprenas kaj akceptas la partoprenkondiĉojn kaj regulojn el la Kongresa Regularo, p. 6-9 (ilei.info/dok/regularo_konferencoj.rtf, aŭ vidu sekvapaĝe la koncernajn regulojn el la punktoj 6 kaj 7)

Loko, dato _____ Subskribo _____

Viajn aliĝilojn bonvolu sendi paperpoŝte, aŭ la skanaĵon rete, al:

William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono, <ilei.kasisto@gmail.com>, kun porinforma kopio al la estrarano pri konferencoj <radojica.petrovic.rs@gmail.com>

Prefere uzu la elektronikan aliĝilon (la ligilo troveblas ĉe www.ilei.info):

[https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSe-](https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSe-qbOKp190oU8VwP7cTJwDNUV73eQppfHHjzxU5i13_6CmA/viewform)

[_qbOKp190oU8VwP7cTJwDNUV73eQppfHHjzxU5i13_6CmA/viewform](https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSe-qbOKp190oU8VwP7cTJwDNUV73eQppfHHjzxU5i13_6CmA/viewform)

Kotizoj

- A. Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.
- B. Ekssocialismaj landoj de orienta Eŭropo; landoj de Latinameriko, Afriko kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko).

Aliĝperiodo:	ĝis 31.03.2017		ĝis 30.06.2017		post 30.06.2017	
Aliĝkategorio:	A	B	A	B	A	B
Membro de ILEI ⁽¹⁾	65 €	40 €	75 €	50 €	90 €	60 €
Ne-membro	80 €	50 €	90 €	60 €	105 €	70 €
Infano ⁽²⁾	10 €	10 €	10 €	10 €	10 €	10 €
Junulo ⁽³⁾ , handikapulo ⁽⁴⁾	40 €	30 €	45 €	35 €	50 €	40 €
Familiano ⁽⁵⁾	50%	50%	50%	50%	50%	50%
Nur-simpozio ⁽⁶⁾	40 €	30 €	45 €	35 €	50 €	40 €

- (1) Membro estas tiu, kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro 2017. Honoraj membroj ĝuas 100%-an rabaton .
- (2) Infano: kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 2001.
- (3) Junulo: kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 1987.
- (4) Handikapulo. Bonvolu sendi al ILEI atestilon.
- (5) Familiano de alia aliĝinto, aŭ akompananto de handikapulo, pagas 50% de la kotizo kiun li aŭ ŝi pagus aliĝante sola.
- (6) Nur-simpozia aŭ unutaga aŭ dutaga partoprenanto.

El la Konferenca Regularo, valida kiel kongresa regularo

6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco. [...]

7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. [...]

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: Mireille Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Goro Kimura, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net*.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsafia.korody@esperanto.de*.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**.
Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Reprzentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et

Charbillac, *monique.arnaud@aliceadsl.fr*, Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. **Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <*ilei.kasisto@gmail.com*>. Bv klare indiki la celon de via pago.

La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Presado:** Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140 [baldaŭ venos nova adreso!], BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktoro:** NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, *jozefo.nemeth@gmail.com*, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, <*moerbeekr@gmail.com*>.

**Ni fermis la nunan numeron la 31-an de oktobro 2016,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de januaro 2017.**

Nia kongresejo ARPINA en Busan, Koreio



